# KATOLIKA SENTO

'71




7

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV

# KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

**Anno 50° - 1971**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

KATOLIKA SENTO

N° 7 - Julio 1971

50a jaro



Homilio de Paŭlo VI dum la meso por malsanuloj:

VIRTO ELAĈETANTA LA SUFERON

Saluton al vi ĉiuj, Fratoj kaj Filoj tre karaj!

Al vi, Sacerdotoj, agantoj kaj servantoj de la Eŭkaristio: hodiaŭ, soleno de la Korpo kaj de la Sango de Kristo, estas festo granda por via elekto, por via perado, por via duobla identigo: kun la popolo de Dio, al kiu vi apartenas, kiel fratoj kaj kiel servantoj en la o-

fico; kun Kristo, kies miraklajn povojn, kiuj vin asimilas al Li, vi praktikas kiel sacerdotoj kaj kiel viktimoj en la eŭkaristia ofero! Meditu kaj jubilu en silento: estas via festo!

Al vi saluton, Fideluloj ĉiuj, kiuj ĉi tie por ni reprezentas la katolikan Romon, centran Urbon de la tuta Eklezio, ĝian historion, ĝian fidelecon, ĝian nunan vivantecon; kaj kiuj volas esti kun ni por celebri la renkonton sakramentan kaj senfinan kun Kristo viva, en la fido, en la espero, en la amo!

Al vi, precipe, karaj, karegaj Malsanuloj, kiuj portas al ĉi tiu celebrado la incenson brulantan kaj parfuman de via doloro, kaj donas al ni la ĝojon renkonti vin, esti unu horon proksime de vi, esprimi al vi nian kortuŝitan amemon, partopreni en viaj afliktoj kaj en viaj preĝoj, saluton, saluton! Ho! kiom mi volus, ke en ĉi tiu bondeziro estu la virto, kiun ĝi signifas kaj aŭguras, tiu sano, kiun Jesuo, Li, Filo de Dio, kaj Filo de l' homo, liveradis al malsanuloj kaj al suferantoj renkontataj dum sia surtera restado: Li jes, ĉiujn konsoladis kaj sanigadis: "El Li - skribas Sankta Luko, la evangeliisto kuracisto - emanis forto, kiu sanigis ĉiujn" (Lk 6, 19). Al ni ne estis transdonita tiu mirakla povo, sed la povo, ne certe malpli valora, komuniki ne la fizikan sanon, sed la spiritan savon; kaj tion nun ni volus iumaniere gustumigi al vi, celebrante kune kun vi kaj por vi ĉi tiun feston misterplenan kaj grandiozan de la Korpo, de la Sango de Kristo. Vi suferas je du malsanoj: unu fizika, al kiu kuracistoj kaj helpantoj klopodas, kun tiom da lerteco kaj zorgo, porti rimedon; la alia spirita, kiu ne estas malpli grava, sentata kaj komplika: al ĉi tiu almenaŭ la nuna celebrado povas porti konsolon.

Kiel, do? Aŭskultu momenton. Kia estas la vera signifo de ĉi tiu ceremonio? Kio okazos dum ĉi tiu rito, kiel ĉiam, kiam estas celebrata Meso? Okazos tio: Jesuo, Li mem, Jesuo Kristo ĉeestos, estos ĉi tie, estos inter ni, estos por vi. Ni estas elvokantaj ne nur lian memoron, sed lian ĉeeston, lian ĉeeston realan, vualitan, kaŝitan, atingeblan nur por tiuj, kiuj kredas je lia dia parolo, ripetata, kaj potenca, de tiu, kiu posedas lian miraklan sacerdotecon; kaj ĝi estas ĉeesto vera, viva, persona. Li, Jesuo benita, ĉeestos. La Eŭkaristio estas antaŭ ĉio mistero de ĉeesto. Ni pensu bone: Jesuo konservas en ĉi tiu formo kaj en ĉi tiu horo sian profetan parolon: "Mi estos kun vi ĝis la fino de la tempoj" (Mt 28, 20). "Mi ne lasos vin orfaj: mi venos al vi" (Jo 14, 18). Tion li diris, kaj tion li faras. Li estos ĉi tie por ni, por vi, por ĉiu el vi. Nun diru, vi subpremataj de la sufero: ĉu ne estas la soleco, la sento esti solaj kaj preskaŭ apartigitaj disde ĉiuj, tio kio igas peza, kaj iufoje netolerebla kaj senespera, vian suferon? La doloro estas, per si mem, izola; kaj tio timigas kaj pliigas la fizikan turmenton. Nu, por tiu, kiu kredas je la Eŭkaristio, por tiu, kiu havas la bonŝancon ricevi ĝin, ĉi tiu terura interna soleco ne plu ekzistas. Li, Jesuo, estas kun tiu, kiu suferas. Li konas la doloron. Li ĝin konsolas. Li ĝin partoprenas. Li estas la interna kuracisto. Li estas la amiko de la koro. Li aŭskultas la ĝemojn de la animo. Li parolas ĉe la fundo de la spirito.

Kial vi aŭskultas ankoraŭ ĉi tiun lingvaĵon propran al la Eŭkaristio?

Ni diris al vi: Jesuo ĉeestos. Sed kiel Li ĉeestos? Li ĉeestos, kvankam en maniero ne sanganta, kiel "la homo de la doloroj" (Jes 53, 3); kiel viktimo, kiel "ŝafido de Dio" (Jo 1, 29); Li ĉeestos kia Li estis en la

horo de sia pasiono, de sia ofero, kiel krucumito. Tion signifas la duobla formo de la pano kaj de la vino, figuroj de la Korpo kaj de la Sango de Kristo mem. Jesuo sin oferas por ni kaj al ni, kia Li estis sur la kruco, foroferita, korŝirita, konsumita en la doloro portita al la plej alta grado de fizika sensiveco kaj de spirita afliktego. Ĉu vi memoras liajn lamentojn tre homajn: "Mi soifas (Jo 19, 28); kaj liajn nedireblajn turmentojn: "Mia Dio! mia Dio! kial Vi forlasis min?"(Mt 27, 46); ĉu vi memoras? Kiu suferis kiom Jesuo? La suferado estas proporcia al du mezuroj: al la sensiveco (kaj kia pli subtila sensiveco ol tiu de Kristo, Homo-Dio?), kaj al la amo: la kapablo ami estas mezurata laŭ la kapablo suferi. Ĉu vi komprenas, kial Jesuo estas via ekzemplo, estas via kolego, viroj kaj virinoj, kiuj ĉi tien portis viajn vivojn dolorantajn? Ĉu vi komprenas, kial ĝuste kun vi mi volis celebri la solenon de la Korpo kaj de la Sango de Kristo?

Kaj ni diros al vi plie: Ĉu vi komprenas nun, kio estas la komunio, kaj kion la ricevita Eŭkaristio plenumas en vi? Ĝi estas la fandiĝo de via sufero kun tiu de Kristo. Ĉiu el vi povas ripeti pli prave ol ĉiu fidelulo, kiu komuniiĝas, la parolojn de Sankta Paŭlo:"... mi ĝojas en la suferoj..., kaj kompletigas en mia karno tion, kio mankas en la suferoj de Kristo" (Kol 1,24). Suferi kun Jesuo! kia sorto, kia mistero! Jen, jen granda novaĵo: la doloro ne estas plu neutila! Se ĝi estas kunigita kun tiu de Kristo, nia doloro akiras ion el sia virto pentofara, alaĉeta, sava. Ĉu vi komprenas, nun, kial la Eklezio tiom honoras kaj amas siajn malsanulojn, siajn malfeliĉajn filojn? Ĉar ili estas Kristo suferanta, kiu, ĝuste per sia pasiono, savis la mondon. Vi, karegaj malsanuloj, povas kunlabori por la savo de la homaro, se vi kapablas kunigi viajn dolo-

rojn, viajn suferojn kun tiuj de Jesuo, kiu nun venos al vi en la sankta komunio.

Permesu, do, ke ni adresu al vi peton, sugestante al vi doni al viaj suferoj la saman intencon, kiu inspiris al la Apostolo, kies famajn vortojn mi citis al vi, ĉi tiujn aliajn, kiuj kompletigas lian penson: "Mi ĝojas - li diris - pri miaj suferoj, kompletigante la pasionon de la Sinjoro, por lia korpo (mistika), kiu estas la Eklezio" (Kol 1, 24): nu, tion ni petas de vi, ke vi oferu (rimarku: suferi fariĝas oferi) viajn dolorojn por la Eklezio; jes, por la tuta Eklezio, kaj, speciale, por ĉi tiu roma Eklezio. Vi, verŝajne, konas ĝiajn bezonojn.

Vi kaj ni, tiamaniere, kune estos digne celebrintaj la feston de la Korpo kaj de la Sango de Kristo; feston de doloro, de amo, de konsolo, de espero, de savo, por vi kaj por ĉiuj.

(tr. L. Minnaja)

LA ĈIJARA UNIVERSALA KONGRESO de Esperanto, 31.VII.-7.VIII., estos celebrita en Londono, Britujo. En la kadro de la Kongreso okazos ankaŭ fakkunveno de IKUE, kiu, estante la unua post la elekto de la nova Prezidanto, estos aparte grava pro la elekto ankaŭ de la estraro, pro la gvidlinio kaj la koncerna nova agadprogramo, kiuj estos anoncitaj. Tre interesa estas la informo, ke, ĉar samtempe okazos la Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, ili povos partopreni en la katolika diservo, la 1-an de aŭgusto, sekvante la tekstojn pretigitajn por tiu evento en Braille.

ELDONEJO "Ekumena Esperanto" prezentas jenajn eldonaĵojn: "La Vojoj de la Eklezio" - Encikliko de Paŭlo VI - 77 paĝ. Svisaj frankoj 4. "Patro la horo alvenis" - Ekum. Preĝoj - 53 pag. sv. fr. 2 - "Sankta meso: la ordinara teksto" - sv. fr. 1 - "Populorum pro-

gressio" - Enckl. de Paŭlo VI - 24 paĝ.sv.fr. 0,50
"Kanto honore al Kristo Reĝo" - 4 paĝ.folio - 10 ekzempl.: sv.fr. 0,50. Mendu ĉe: Eldonejo Ekumena Esperanto. CH-9106 Zürchersmühle/Svislando.

CENTRO ESPERANTISTA CATTOLICO ROMANO
N° 95

LA 27-an DE JUNIO, je la lasta dimanĉo de nia socia jaro, la romaj esperantistoj kunvenis por reciproki inter si salutojn kaj bondezirojn, antaŭ la preskaŭ ĝenerala foriro el Romo. Kvankam diversaj el ili jam anticipe foriris, multaj tamen ankoraŭ ĉeestis. S-ano Luigi Minnaja prenis sur sin la taskon de la saluto, kaj profitis la okazon por paroli pri tre interesa temo:"La unua libro pri Esperanto", kies grava datreveno okazos la 26-an de julio, kiam ni en Romo ne plu kunvenas. Grandan intereson vekis la prezentado de la fotokopio de tiu libro, en la rusa lingvo, kaj de la originalo en la pola.
Fine, tre aklamite, li recitis sian novan odon, dediĉitan al Varsovio, kvazaŭ por danki pro la genia, grandioza interkomprenilo, kiu aperis tie unuafoje, kiel el fonto de alta inspiro. Li mem volis klarigi, ke en la unua strofo li parolas pri la apero de la unua libro; en la dua pri la titana homama laboro de la aŭtoro, vere escepta homo, kiu, dum sia mallonga vivo, donis superabundan produkton; en la tria li priparolas la forpason de la granda homara bonfaranto.

Por la ĝojo de niaj legantoj ni publikas la belan poeziaĵon:

# VARSOVIO !

Vistulo tra la urbo malrapidis
en tiu sunoplena tag' julia,
kiam la lumon el presejo vidis
verketo simpla, tamen altgenia.
Ĝi estis frukto de multjara, peza
cerbumo de talenta mensgiganto,
pri la homara idiom' sinteza,
sub la kaŝnom' "Doktoro Esperanto".
Ekĝermis nova frata religio
ĉe vi, gastama, digna Varsovio.

La homo vivis arde, verkinkline.
fervore en l' aktiva pen' titana,
kaj venkis ĉiun baron plej obstine,
senlace firma en labor' spontana.
De kor' al koro migris lia voko
insista, voĉe, skribe, proze, verse:
interfratiĝo, ama reciproko,
aspir' eterna, homa universe.
Li revis pri l' tutmonda harmonio
en via koro, rava Varsovio.

Ho ve! Printemp' malvarma, griza, trista!
Faladis la dekkvara tag' aprila;
Pollando vivis en angor' persista,
Vistulo ŝvela fluis maltrankvila.
Dum kun detruoj, mortoj kaj hororo
disflamis la milita furiozo,
por ĉiam haltis lia laca koro,
ĉe via sino kuŝas en ripozo.
Ĝi batis ame, gardu ĝin kun pio,
vi, ter' martira, sankta Varsovio!

Luigi Minnaja

ALIĜIS AL UECI-CECR kun la bulteno: Romo: R.Corsetti; L.Patrizi; Castelmassa (Bolonjo): L. Fajoni; Cividale al Piano (Bergamo): F.Belleboro; Padova; Trieste; Udine: E/Grupo; Britujo: J.Brady; Ĉeĥoslovakio: V.I.Morava; Hispanujo: M.Perez; Hungarujo: A. Marky; A.Kiss; Jugoslavio: M.Fosin: R.Kraly; V. Rajkovic: Nederlando: J.T.Fischer; D.de Boer; Portugalujo: G. Pausback.
Entute: 407

PASTROJ, KIUJ INTENCAS ALIĜI, povas celebri unu meson intence de p.Jacobitti, nur avertante lin pri tio. Aliaj personoj, kiuj preferas tiun aliĝmanieron, povas peti la samon de katolika pastro - kiel supre dirite - sed estas petataj sendi al p.Jacobitti konfirmon, se eble pri la celebr(i/o)ta meso, subskribita de la pastro. Tamen, kiuj eĉ ne tiamaniere povas fari, kaj tamen ŝatas la bultenon, petu de p.Jacobitti ĝian senpagan sendadon.

NI GRATULAS KAJ BONDEZIRAS al d.ro Klaus Perko, (Graz - Austrujo) kiu la 5-an de junio edziĝis kun la ĝentila fr-ino Irma Indinger.

RADIO ROMA - ESPERANTO. Julio 1971-a.
Dimanĉon la 4-an: Novaĵoj el Italujo; la 11-an: Italaj vulkanoj: Etna; la 18-an Leterkesto; la 25-an: Famaj eksterlandaj vizitintoj de Italujo dum pasintaj jarcentoj. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". La dissendoj okazas de h. 21.00 ĝis h. 21.20 (M.E.T.). Ondlongoj m. 25,42 - 30,90 - 41,24.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

El Romo, centro de la katolika mondo kelkaj informoj pri la vivo kaj agado de l' eklezio:

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

JE LA 23-a DE MAJO, kvina "Tutmonda Tago de la Sociaj Komunikiloj", en kiu aperis la koncerna papa instrukcio - pri kio ni tuj parolos - la papo anoncis ĝin al la fidelularo kunveninta por lin saluti, en la Sankta Petro - placo. "Kio estas la sociaj komunikiloj? - demandis la papo; kaj li mem klarigis: "Ili estas la rimedoj, la instrumentoj, la periloj, pere de kiuj la homoj interŝanĝas sciigojn, informojn, opiniojn, prijuĝojn, kritikojn, intencojn, instruojn, propagandojn, pensojn. Ili estas la komplekso de interparoloj, admonoj, polemikoj kies disvastigo emas fariĝi pli kaj pli tutmonda, precize pere de la modernaj teknikoj de la presaro, filmindustrio, radio, televido." La eklezio devas priatenti ĉi tion, por kontroli, ke ili estu vere por la bono kaj ne por la danĝero al la tuta homaro. Unu el ĉi tiu efektoj - diris ankoraŭ la papo - estas, ekzemple, unuigo, eĉ unueco, kiu ĉefe postulas amikecon kaj pacon inter ĉiuj homoj; kaj kiun la tuta eklezio, ĉiu kristano, devas deziri, favori, kaj peti de Dio, el kiu venas al la mondo ĉio bona". La citita grava eklezia instrukcio, pri kiu dum 5 jaroj daŭre laboris ekspertoj en la tuta mondo, estas la plej granda kaj kompleta ekzameno de la amas - rimedoj kaj de la modernaj komunik- teknikoj, kiun la eklezio ĝis nun plenumis. La dokumento tamen ne nur ekzamenas, sed donas ankaŭ precizajn direktivojn. Fakte, ĉi tiu dokumento, kiu sekvas la koncilan dekreton de la 1964-a "Inter mirifica", estas granda antaŭenpaŝo kompare al ĝi; eĉ, anstataŭ la iom timema sinteno de tiu koncila dekreto, ĝi baziĝas sur optimisma kaj entute po

zitiva pritaksado de tiuj donacoj, kiuj estas la komuni kaj instrumentoj, destinitaj, laŭ la dia providenco, por kunigi frate la homojn kaj igi ilin kunlaborantoj en la dia savplano. La unua parto donas teologiajn orientiĝojn pri la materio: "Kristo estas la perfekta komunikanto, kaj sekvante liajn metodojn kaj ekzemplojn, la homoj kapablos uzi siajn sociajn komunikilojn por restarigi la homan fratecon sub la dia patreco". La dua parto indikas la kondiĉojn por la plej efika kaj fruktodona uzo de la instrumentoj. Kvankam la dokumento agnoskas la danĝerojn kontraŭ la moroj, eblajn en kelkaj iliaj kampoj, tamen ĝi asertas, ke tio devenas nur de la malforteco de la socio, kaj ne de la instrumentoj per si mem. Pro tio ĝi invitas al perfektiĝo de la aktivaj kaj pasivaj komunikantoj. Inter la unuaj estas gepatroj, publikaj aŭtoritatoj "por ke estu garantiataj la individuaj rajtoj kaj evitataj malutilaj cenzuroj, danĝeraj al la libereco"; estas internaciaj rilatoj por helpo al subevoluintaj landoj. La tria parto estas ĉefe dediĉita al la katolikoj rilate al publika opinio, informorajto, libera dialogo interne de la eklezio. Oni devas prizorgi, kaj, se necese, reĝustigi prezentadon de informoj, kiuj koncernas religiajn argumentojn kaj rilatas la vivon de l'eklezio". Eĉ, oni devas konsideri ĉi tion, kiel apostoladon, por ke la dia popolo, sammarŝante kun la eventoj de la nuntempa historio, kaj rigardante kun fido al la estonteco, scikapablu uzi pri la amaskomunikiloj, antaŭvidante tion, kion ili promesas en la nova spaca erao.

PRI LA GEEDZAJ PROCESOJ aperis la 13-an de junio, "Motu Proprio" de Papo Paŭlo VI, kun celo plirapidigi ilin. Jam en la Dua Vatikana Koncilo oni petis tion; kaj cetere la nombro de tiuj procesoj pli kaj pli kreskadis, kaj pro ilia longeco multaj eklezaj filoj su

feris en sia spirita kondiĉo. Tio estis ankaŭ grava zorgo por la eklezio, kiu devas priserĉi la bonon de la animoj. La "motu proprio" plilarĝigis la kompetentecojn, asignante ilin al la lokaj ekleziaj tribunaloj, kie la plendintoj sufiĉe stabile loĝas, aŭ kie oni devos kolekti la plej grandan parton de la depozicioj aŭ pruvoj. La episkopaj konferencoj starigos kolegion da tri juĝistoj, el kiuj unu povos esti laiko. Eĉ, kiel notario povos ek de nun funkcii ankaŭ virino. Ĉi tiu estas unu el la plej interesaj novaĵoj de la papa "motu proprio", kiu liveras ankaŭ al laikoj eklezian jurisdikcion. Du diversaj estas la tribunaloj, kiuj pritraktas la saman kaŭzon, la "ordinara" kaj la apelacia; kaj ĉi tiu aŭ aprobos la unuagradan decidon, aŭ submetos la proceson al duagrada ordinara esploro. En la unua kazo, se neniu apelacias, la kunvokitoj, kiuj havas nenian alian malhelpon, povos post dek tagoj denove edziĝi. Kiam per dokumento certa kaj aŭtentika, pri kiu oni ne povas opozicii, estas certigita nuliga impedimento, la episkopo mem povos tuj deklari la ne-ekziston de la unua geedziĝo.

ANTAŬTAGE DE LA SOLENO de la Korpo de Kristo, dum la ĝenerala aŭdienco en Sankta Petro, la papo alparolis la ĉeestantan kredantaron pri la dia eŭkaristio. Memorante, ke la soleno havis sian unuan manifestiĝon nur en la XIII-a jarcento, la papo rimarkis, ke tio ne devas mirigi: tio atestas la progresantan konscion de la eklezio pri la riĉaĵoj de vero kaj graco, kiujn ĝi havas ĉe si, kaj la kreskantan amon per kiu ĝi respondas al la Diaj donacoj. Cetere ĉiam la eklezio, aldonis la papo, kredis en la reala ĉeesto de Kristo en la eŭkaristiaj akcidencoj, kiel atestas la sendado de la "sanktaĵoj, aŭ fermentaĵo" al la malsanuloj, ktp. ankaŭ en la pratempa eklezio. La Sinjoro restas en la sakramentaj akcidencoj; kaj ĉi tiu ĉeesto ne nur praviĝas sed postulas propran kulton". La papo admonis pri la necesa preparo al la sankta komunio; kaj inter la multaj

konsideroj pri tio, li elektis tri: kredo, interfrata komunio, konsciencekzameno. Hodiaŭ troviĝas kelkaj, kiuj klopodas liberigi la fidelulojn el ĉi tiu lasta necesa kondiĉo. Sed, demandas la papo, ĉu estas ankoraŭ "fideluloj" tiuj, kiuj permesas al si tion? Necesas havi puran animon, necesas reakiri la gracon per la pento, per la reĝustiga sakramento, antaŭ ol oni alpaŝu al ĉirkaŭpreno de Kristo!"

Pri ĉi tiu temo, post la papaj instruoj, ni volas mallonge memorigi pri la evoluo de la eŭkaristia soleno, laŭ la admono de la Dua Vat. Koncilo, kiu "spronas al la ĉiutaga vizito al la sankta tabernaklo kaj al la praktiko de la persona kulto por la sankta eŭkaristio". La plej antikva teksto pri la kulto de la eŭkaristio ekster la meso estas verŝajne la "apologio" de la konvertita filozofo kaj martiro sankta Justeno, ĉ. la 150-a jaro, letero kiun li direktas al la imperiestro Antoneno Pio, al la senato kaj al la roma popolo, defende de la kristanoj. En tiu raporto oni informiĝas pri la "diakonoj" kiuj disdonas la eŭkariston al la ĉeestantoj, kaj poste portas la sakramenton ankaŭ al la neĉeestantoj. El Tertuliano (ĉ. la fino de la dua jarcento) oni konas ankaŭ la terminon "rezervitaĵo", kiu indikis la eŭkaristian panon konservitan hejme ĉe la kristanaj familioj por la ĉiutaga komunio. Ek de nun la dokumentoj estas multaj. En la dekunua jarcento, kiel oni legas en la kronikoj de Cantorbery, oni havis ĉiujaran eŭkaristian procesion. Sed la epoko, en kiu la eŭkaristia kulto rapide evoluiĝas, estas la dektria jarcento. La beata Juliana, monakestrino en Montkorniliono (Belgujo) estis elektita de Dio por la propago de la eŭkaristia kulto. En la 1208-a komenciĝis la vizioj, rilatantaj la starigendan feston de la tre sankta sakramento, tuj aprobitan kaj poste disvastigitan al la tuta eklezio pere de papo

Urbano IV, en la 1264-a. Ĉi tio okazis post la memo-rinda eŭkaristia miraklo de la 1263-a en Bolsena, kiam sacerdoto Petro el Prago, turmentite pro la duboj pri la reala ĉeesto de Kristo en la eŭkaristio, decidis pil-grimi al la tombo de Petro en Romo por liberiĝi de tiu tento. Kaj jen, vojirante al Romo, en Bolsena, ĉe Or-vieto, dum li mescelebrante, rompis la hostion, ĉi tiu aliiĝis al sanganta karno. Terurigite, li naive klopodis kaŝi ĝin en la korporalo; ĝis li konfesis ĉion. Tiam Ur-bano IV, kiu tiam loĝis en Orvieto, ordonis al episkopo Jakobo I, ke li prenu la hostitukon kaj portu ĝin solene al Orvieto, kaj li mem iris kun granda popolamaso ren-konte al la sankta korporalo. Glore de la tre sankta sa-kramento la orvietanoj decidis starigi sanktejon, kiu e-stas unu el la plej belaj temploj en la mondo, la "ora li-lio de la katedraloj".

EN LA SEKRETARIATO POR UNUIĜO de Kristanoj, P. Walter Abbot, S.J. mallonge raportis pri la progresoj faritaj en ekumena spirito por la traduko kaj disvastigo de la Biblio inter katolikoj kaj ne katolikoj. La papo do-nis pasintjare 25.000 dolarojn por la revizio de la No-va Testamento en la Greka, kaj de la Malnova en la he-brea. En Afriko la episkopaj konferencoj aprobis kel-kajn tekstojn prilaboritajn de la B.S.(Biblia Societo) aŭ kunlabore kun ĝi: ok en Zambio, kvar en Tanzanio kaj Kenjo, du en Niĝerio kaj unu en Kongo Kinshasa. En la Konga provinco de Katanga ĉiuj eldonaĵoj de B.S. estas aprobitaj. Oni kunlaboras por la tekstoj en 45 A-frikaj lingvoj. En Azio sep tekstoj de la B.S. estis a-probitaj de la katolika eklezio. Oni aktive kunlaboras por tradukoj en 33 lingvojn. La katolikoj de Tajlando mendis 254 mil ekzemplerojn de la tekstoj de la B.S. de Hongkongo, kaj en Indonezio oni donis ĉiujn monofe-rojn de unu dimanĉo al la B.S. En Novgvineo la Sekre-

tario de la B.S. de Aŭstralio estis invitita prediki en la katolika katedralo, kaj en la episkopa konferenco raportis pri la laboro plenumita en sia societo. Ankaŭ en la Latina Ameriko oni kunlaboras por novaj tradukoj en sep lingvojn. Kaj oni akordiĝis inter ĝiaj episkopoj kaj la protestanta komuno de Taizé por unu miliono da tekstoj en la hispana kaj kvincent mil en la portugala.

LA REPREZENTANTOJ DE 52 religiaj institutoj partoprenis ĉe Frascati apud Romo en la ĉiujara asembleo de la plej altaj superuloj de ordenoj kaj kongregacioj. Sub prezidanteco de p. Lacuyer oni pritraktis detale la temojn, kiujn oni pridiskutos en la proksima Sinodo. La renkontiĝo ne celis atingi rezoluciojn, sed inviti ĉiun instituton, je ĉiu nivelo, enprofundigi la temojn kaj esprimi sian prijuĝon. La Unuigo de la Ĝeneralaj superuloj sendos al la Sinodo dek reprezentantojn, kaj pere de ili aŭdigos oportune sian voĉon.

LA PAPA INSTITUTO "FREMDLANDAJ Misioj havis en Romo komence de junio sian nuntempigan kunvenon. Partoprenis en ĝi 53 inter episkopoj kaj misiistoj, ĉiuj spertistoj kaj reprezentantoj de multaj aliaj kunfratoj, laborantaj en Japanujo, Hongkongo, Filipino, Birmo, Hindujo, Pakistano, Kameruno, Portugala Gvineo, Brazilo, Usono kaj Italujo. Ne povis interveni du misiistoj el Pakistano kaj el Birmo, pro la malfacilaj kondiĉoj de siaj landoj.

"TRADICIISTAJ KATOLIKOJ" pilgrimis al Romo, okaze de Pentekosto, "por petegi de la Sankta Spirito sur la sanktan Patrinan eklezion en ĉi tiu malfacila momento specialajn lumojn". Kelkaj el ili apartenis al la Rom katolika Eŭropa Centro", sed la plimulto al la franca "Milito de la Kredo" kaj al "Komitato por la defendo de

la kristana civilo. La pilgrimado estis nomita: "La du a marŝado al Romo". Ili, dum preskonferenco insistis, ke la nuntempiĝo de la eklezio en la liturgia kampo estis grava danĝero por la kredo. Pro tio, ili deklaris, necesas intensa agado por reveni al la tradicio. Ili kuniĝis en preĝejo S. Andrea della Valle, kie oni kantis latinan meson. La 21-an ili pasigis la nokton preĝante ĉiam latine en la placo Sankta Petro. Tamen ili ne sukcesis esti ricevitaj de la papo, kaj sian malĝojan surprizon pro tio ili esprimis en alia preskonferenco. Kvankam ili estis verŝajne 6 mil, el diversaj eŭropaj landoj, laŭ la organizintoj, la pilgrimado ne atingis grandan partoprenon. Sed oni komprenas la ne favoran sintenon de la S. Seĝaj aŭtoritatoj, kiam oni pripensas, ke la tradiciistaj katolikoj estis nenio alia ol kontestantoj: inter ili ne mankis iuj, kiuj venis precize por postuli tute simple de Paŭlo VI rezignon de lia papeco!

NOVA VATIKANA POŜTMARKSERIO estis eldonita je la 25-a de majo, memorige de la ok jarcenta datreveno de la naskiĝo de S. Dominiko de Guzman, fondinto de la dominikana ordeno. La serio, enhavanta reproduktaĵojn de kvar pentraĵoj pri la sanktulo, kostis entute £. 350. Sed ĉar unu el tiuj reproduktaĵoj estis kontestita, kvazaŭ ĝi rilatus S. Vincenton anstataŭ S. Dominikon, la serio fariĝis tuj objekto de granda intereso en la filatela mondo. Dum nur du tagoj la serio estis elĉerpita kaj akiris pli grandan valoron. (Ĉiokaze, ni memorigas ke nia redakcio provizas kutime la novajn vatikanajn seriojn - same kiel la Italajn kaj la San Marinajn - purajn aŭ sur unuataga koverto, kun indiko ankaŭ en la esperanta, al niaj abonintoj, laŭ ilia peto).

GVIDO MONZINO, GVIDANTO de la Nordpolusa ekspe

dicio, feliĉe plenumita ĉe la duono de junio, ricevis an kaŭ de la papo gratultelegramon, subskribitan de la ŝtata sekretario kard. Villot. Post la fino de sia entrepreno, Monzino informis Paŭlon VI, radie, ke li starigis ĉe la poluso krucon, faritan per sleda ligno, memore de la italaj kaj eksterlandaj mortintoj en la arkta regiono, kaj kiel kredateston.

LA UNUA ĈIJARA NUMERO DE Mitt. der Kath. Akademikerseelsorge raportas el Mons. Atto Mauer pri la esperoj kaj la malfacilaĵoj de la Aŭstria eklezio. La ĵurnalo dum reliefigas pliigon pri agadoj kaj iniciatoj ĉefe en la paŝtista kaj socia kampo, montras aliflanke zorgoplenan malpliigon - kiel cetere en granda nombro da aliaj landoj - de la praktikantaj katolikoj. La plej multo el ĉi tiuj apartenis al tiuj, kiuj restis en la eklezio pro forto de inercio, sen profunda konvinko: ili iom post iom eksplicitis sian internan pozicion, formale lasante la eklezion. Ĉefaj kaŭzoj de tiu krizo estas la "sekulariga" proceso, kaj la eklezia rifuzo de divorco; dum la kampanjo kontraŭ pornografio kaj erotismo atingis grandan sukceson, kolektante amason da subskriboj por postuli de la aŭtoritatoj energian intervenon.

KARD. FRANZ KÖNIG, ĉefepiskopo de Vieno, iros baldaŭ al Budapeŝto. Tion deklaris proparolanto de la ĉefepiskopo mem, aldonante, ke kard. König vizitos kardon Mindszenty, ĉar jam pasis sufiĉe longa tempo post lia lasta vojaĝo al Budapeŝto. La Viena ĉefepiskopo estas la unika ne amerika persono, kiu povis renkontiĝi kun kard. Mindszenty, en la usona ambasadejo, kie li petis rifuĝon en 1956. Kard. König deklaris, ke li ne scias, kion oni diris en Romo dum la aŭdienco de la papo al la hungara ministro por eksterlandaj aferoj, Ja-

nos Peter; sed li memoris, ke kard. Mindszenty iam diris: "Se la papo petos de mi, ke mi forlasu Hungarujon, mi obeos". Laŭ kard. König tamen la papo ne petis, nek petos tion, se antaŭe oni ne forstrekos lian kondamnon, laŭ la kondiĉo metita de la hungara kardinalo mem.

LA KONFERENCO DE LA KATOLIKAJ Organizoj (OIC) ĉe Bruselo fermiĝis komence de junio post intensa kaj fruktodona laboro. La diversaj grup-studoj dividis inter si agadojn kaj priserĉojn pri la rolo de la konferenco, pri ĝiaj rilatoj kun la laikkonsilio, kun la romaj kongregacioj kaj kun la Komisiono por Justeco kaj Paco; pri la politikaj respondecoj post la Apostola Letero de Paŭlo VI "Communio et Progressio"; pri ekumenismo; ktp. De pli ol du jaroj estis en preparo dokumento pri la difinkriterioj de la katolikaj internaciaj organizoj. La studo estis asignita precipe al la laik-konsilio, kiu post diversaj konsultoj kun la multaj organizoj, prezentis tion al la papo, kiu ĝin aprobis por du jaroj, eksperimente. Oni funde pridiskutis tion en la asembleo OIC, por konformigi ĉiujn agadojn al la superaj direktivoj cele al pli organika laboro.

KARD. HEENAN, ĈEFEPISKOPO de Westminster (Britujo) defendis la laboron faritan en la katekismaj centroj de la lando. "Malbonan servon al la kristana doktrino faris tiuj, kiuj ne agnoskas, ke novaj instrumetodoj estas necesaj ankaŭ por la religia instruado". Ili estis akuzitaj, kvazaŭ ili malfortigis la kredon en la knaboj al ili konfiditaj. Oni povas havi kelkajn rezervojn - diris la kardinalo - kaj li mem tion agnoskas; sed ili estas neeviteblaj ĉe transira situacio, kiel estas la nuntempa. Cetere estas ĝenerale malkonsentita ankaŭ eksterlande la malnova metodo de demandoj kaj respondoj; kaj hodiaŭ oni emas doni la katekisman instruon a

daptante tion laŭ la klasoj kaj aĝo de la grupoj.

EL LA JUNIA CIRKULERO de niaj Slovakaj Esperantistaj amikoj, ni legas, ke ili ne rezignos klopodi por ricevi aprobon de sia statuto. Ni tutkore bondeziras sukceson. Kaj ke la IKUE-Prezidanto F. Longoni partoprenos en la renkontiĝo ĉe Pribran, la 14-an kaj la 15-an de aŭgusto.

PRI LA TEMO DE LA SACERDOTA ofico, kiu estos diskutita en la proksima Sinodo, aperis dum ĉi tiuj tagoj tre grava kontribuaĵo. La "Editions du cerf" publikis la raporton redaktitan de subkomisiono de la internacia teologia komisiono, enhavante, interalie, von Balthasar, Colombo kaj Guillon.

LA FAMA PROFESORO JEAN ONIMUS estis pridemandita de la redaktoro de la saleza bulteno "Don Bosco Nice" (Francujo): Kiuj estas, laŭ vi, la karakteroj de la "tria kulturo", kiu ekaperas inter la junularo? Tute simple - respondis la intervjuito -. Temas pri kulturo, kiu volas esti la preciza malo de la kulturo reganta ĉe la adultoj de la teknologia socio: ĝi akcentas la neraciecon, spontaneecon kaj kreivecon de libervivа kondiĉo. Kreivecon oni povas vidi en la maniero laŭ kiu sin vestas la junuloj. Ili kreas sian veston laŭ sia fantazio; kaj ili kreas ankaŭ sian meblaron. Kelkfoje ni estas surprizitaj pri la malkonsenta sinteno al la nuna socio. Ĉe Stanford, en Ameriko, mi vidis ŝokantan scenon. La studentoj sin devigis al memimposto por aĉeti belegan amerikan aŭton, progressimbolon. Poste ili fosis grandan kavon kaj enterigis la aŭtomobilon, kun ceremoniaro da funebraj kantoj. Tio, kion ili enterigis per tiu aŭto estis la orgojlo pro la materia sukceso, kio estas la peko de la moderna homo". La Nica bulteno malfermiĝis per la fama preĝo de S.TomasoMore: "Sinjoro, ne permesu, ke mi tro multe zorgu pri

ĉitiu embarasanta afero, kio nomiĝas "mi". Sinjoro, donu al mi humuran senton!"

MALSATSTRIKON DECIDIS DU francaj junuloj en Tuluzo, proteste kontraŭ la preventa aresto de tri studentoj enmigrintaj. Sed la afero estis komplikita pro la loko, kiun la du junuloj elektis pro sia kontestado, ĉar temis pri preĝejo. La sacerdotoj prirespondaj por la preĝejo deklaris, ke ili neniel tion rajtigis; tamen ili ne volas kontraŭmeti perforton al perforto. Raportante pri la fakto, la ĵurnalo "La Croix" reliefigas, ke oni ne pridubas la oferemon de la du junuloj, kaj ke la preĝejoj emas fariĝi la unika libereca loko eĉ por la proklamo de homaj mesaĝoj. Sed oni ne devas forgesi, ke tiaj lokoj celas unue preĝadon kaj repacigon. Porjustecaj kaj porpacaj manifestacioj devas elekti pli alcelajn homajn okazojn kaj rimedojn: politikajn, sindikatajn aŭ kulturajn.

LA UNUA RENKONTIĜO DE LA KATOLIKA kaj protestantaj eklezioj en Germanujo fermiĝis la 5-an de junio en la Aŭgusta stadiono, per ceremonio, kien kunvenis dek ok mil personoj. Oni aŭskultis tri homeliojn: de pastoro Visser't Hooft, honorprezidanto de la Kristana Ekumena Konferenco (CEC), de d.ro Dietzfelbinger, protestanta episkopo, prezidanto de la episkopa Germana eklezio, kaj de kard. Doepfner, prezidanto de la katolika episkopa konferenco. Kiel antaŭvidite, la plej vizitata komisiono estis tiu rilatanta kulton kaj interkomunion. Oni petis enkonduki progresivaninterkomunion, ekzemple ĉe ekumenaj renkontiĝoj kaj miksreligiaj geedziĝoj. Oni konstatis ankaŭ interkomuniojn ne permesitajn; sed la aŭtoritatoj ignoris tion, kvazaŭ ili estis sondaĵoj sed ne ribeloj. Oni petis, ke divorcitoj estu reakceptitaj al la sankta komunio, ĉar la aktuala disciplino de l'eklezio tute ne permesas tion. Neeble estus resumi la centojn da rezolucioj faritaj. Oni povas diri, ke

la renkontiĝo malfermis ŝinceran espero de sukceso.

POR LA BEATIGO DE LA KARMELANO Tito Brandsma estis oficiale enkondukita la proceso, la 26-an de majo ĉe la koncerna roma kongregacio. P. Tito Brandsma, nederlanda ĵurnalisto, estis arestita de la nazistoj dum la lasta tutmonda milito pro lia sinteno kaj agadoj kiel eklezia eksperto por la nederlandaj ĵurnalistoj. Mortis la 26-an de julio en la koncentrigejo de Dakau.

LA SINODO DE LA ORTODOKSA Rusa eklezio estis celebrita en la monakejo de Zagorsk, je 64 km-oj de Moskvo. Metropolito Pimen, kiu havis unuarangan rolon en la preparo kaj en la disvolviĝo de la Sinodo, estis elektita patriarko de la rusa ortodoksa eklezio: la tria patriarko post la oktobra revolucio. Unu el liaj unuaj agadoj estis mesaĝa saluto al ĉefministro Kossighin, dankante lin pro la favora sinteno rilate la helpojn al la ortodoksa rusa eklezio. Ĉeestis pli ol 300 koncilaj Patroj (inter kiuj 70 ortodoksaj episkopoj. Sed neniu ĵurnalisto el okcidentaj landoj estis allasita; tiel ke la sciigoj pri la debatoj, tre viglaj, estas nur la oficialaj de la patriarkato aŭ de la "Tass". Al la surtronigo de la nova patriarko ĉeestis, kiel reprezentanto de la katolika eklezio, kard. Willebrands.

LA SOVETA ATEISMA REVUO "Scienco kaj religio" ĵus publikis komentan artikolon pri la vojaĝo de Paŭlo VI al Azio. La analizo montras moderecon kaj ian objektivecon, kiuj tute ne estas kutimaj en Rusujo pri religiaj aferoj, kaj la aŭtoro I. Davidov donas pri Paŭlo VI kaj pri lia vojaĝo prijuĝon sufiĉe diversan ol tiu estas primita de la publika okcidenta opinio. Fakte Paŭlo VI en Okcidento - diras la revuo - estas konsiderata papo konservativa. Kaj pro tio oni kontraŭmetas lin al Jo

hano XXIII, konsiderata papo de spirita vasteco. Male, -asertas la revuo- Paŭlo VI estas reformista papo, daŭriganto de la agado de Johano XXIII, papo, kiu rompis la tradicion de malliberigitaj papoj kaj fariĝis vojaĝanto kaj pilgrimanto tra la mondo; papo kiu ne interesiĝas ekskluzive pri la ekleziaj problemoj kiel siaj antaŭuloj, sed ankaŭ pri tiuj de la homaro kaj de la mondo. Ĉi tiu, rimarkas "Scienza e religione", estas la signifo de la vojaĝoj al UNO, al la Latina Ameriko, kaj laste, al la Ekstrema Oriento. La soveta revuo substrekas ankaŭ, ke dum sia lasta vojaĝo Paŭlo VI rifuzis la protekton de potenculoj kaj de la lokaj jerarkioj. Li volis esti gasto nek de kardinaloj nek de registaroj sed de la modestaj nunciejoj... Ankaŭ pri la "etuloj" (la revuo uzas ĝuste la evangelian terminon signifantan malriĉulojn) li montris en ĉiuj paroladoj intereson nedubeble sinceran. Pri tio, kion ĝi asertas, kaj pri tio kion subkomprenas, ĉi tiu artikolo montras novan sintenon koncerne la papecon, kiu estas ankoraŭ pritaksata kiel eksplutatisma organo, kvankam la personaj iniciatoj de Paŭlo VI estas konsiderataj kiel kontribuaĵo al paco kaj al justeco. Interese estos ĉi-okaze registri la sovetajn reagojn al la letero de Paŭlo VI por la okdeka datreveno de "Rerum Novarum". Ĝis hodiaŭ, fakte, la soveta presaro ne konis la eventon.

EL ĈIUJ PARTOJ DE LA GRANDA Madagaskara insulo, 500 gejunuloj kun siaj asistaj pastroj, reprezentantaj de 70 grupoj de "Nuntempaj Kristanoj", kuniĝis por kongresi dum 5 tagoj en urbo Moramanga. Antaŭ mondo, kiu pli kaj pli drivas al materialismo, tiuj grupoj volas formi la vivon de la junularo en la kadro de la kristana kredo, celante vivon kunigitan al Kristo. La kongresantoj decidis "evoluigi laŭ la kristana vivo sian personecon ne nur individue sed cele al la malgaŝa socio, kies ili

devas esti fermento. Ne por siaj avantaĵoj, sed unue por la komuna bono, kiun ili celos konkrete per misiaj kampoj, progresigaj laborejoj, vizitoj, enketoj. Ili agados ĉie kaj ĉiam apostole kun la spirito kaj la amo de Kristo, por konstrui pli bonan mondon kaj kunigi la homojn al Kristo, al la unika Korpo de Kristo".

ĈIUJ MISIISTOJ JAM FORPELITAJ de la eksigita prezidento de Ugando, Milton Obole, kun la akuzo, ke ili ne konsentis kun lia politiko, povos reveni al Ugando, se ili tion deziras. Tion anoncis la nova prez. Idi Amin per informo donita ĉe Bugwere kaj dissendita per la radio. Temis pri 11 kombonanaj misiistoj (9 italaj kaj 2 hispanaj). Tiuj misiistoj laboras en sep inter la dek du Ugandaj diocezoj, kun la 242 sacerdotoj kaj 90 kunlaborantaj religiuloj.

LA PORMISIA SOCIETO "BETLEHEMO" celebris la 50-an datrevenon de sia fondiĝo, je la 30-a de majo ĉe Immensee. Hodiaŭ 125 ĝiaj misiistoj laboras en Rodezio, "6 en Formoso, 19 en Kolombio kaj 12 en Usono. La fondinto d.ro Pierre Barral, kiu longtempe estis en Sud- kaj Nord-Ameriko, kaj kan. d.ro Pietro Bondolfi, ĝenerala superulo, konstruis la seminarion kaj malfermis multajn novajn domojn. La misia societo akceptas ne nur sacerdotojn, sed ankaŭ fakulojn pri industrio, instruado, k.s. Ĝia unua celo estas asisti la novajn eklezojn, precipe en la tria mondo kaj peri la intereklezian helpon. Tuj kiam oni juĝas iun eklezion sufiĉe kapabla stari per si mem, oni alpaŝas al nova laborkampo. De kelka tempo al la societo aliĝas ankaŭ portempaj misiistoj, kiuj restas membroj de siaj originaj diocezoj, sed servas al la tria mondo sub la direkto de la Societo. Ĉi tiu klopodas daŭre nuntempigi sian agadlaboron kaj adaptiĝi al la postuloj de la diversaj landoj. Ĉie ĝi klopodas krei indiĝenajn kadrojn en

la branĉoj socia, teologia, ĵurnalista, ktp. kaj oni deci dis, ke la tuta jubilea jaro estu dediĉita al pristudo de la novaj taskoj, por servi la ekleziojn naskiĝantajn kaj bezonantajn pri helpo.

LA EPISKOPA USONA KONFERENCO okazis en Detrojto, centro de la Amerika aŭtomobil-industrio, de la 27-a ĝis la 29-a de aprilo. Partoprenis en ĝi pli ol 200 amerikaj episkopoj, por pritrakti multajn ekleziajn pro blemojn, sed unue la temon diskutota en la Ĝenerala Va tikana Sinodo pri la sacerdota ofico. Kard. Krol, kiuen la antaŭtago de la malfermo de la asembleo faris pres-konferencon, avertis, ke la ne kaŝeblaj problemoj de la hodiaŭa sacerdoteco, kiuj devenas de la profundaj kaj rapidaj moralaj kaj sociaj ŝanĝoj de la nuntempa vivo, ne devas forigi la mirindan kaj unikan vidadon de la kre sko de la katolika eklezio en Usono, kiu el 17,7 milio - noj da katolikoj kaj 21 mil sacerdotoj en la 1920-a, alvenis al 47,8 milionoj da katolikoj kaj 59 mil sacerdotoj, kun pliigo de la 266 procento de siaj membroj kaj de la 295 p.c. en la nombro de la sacerdotoj. La teologia raporto rezultinta el enketo de la unuopaj diocezaj sinodoj prezentis ankaŭ kritikeblajn punktojn, kiel tiun de sacerdotigo de virinoj. Kaj pri celibato, kiu, laŭ tiu raporto, devus esti konsiderita nur libervola kondiĉo, oni aŭdis en la sinodo ankaŭ ekstreme severajn prijuĝojn, kiel tiujn de mons. F. Whealon, ĉefep. de Hartford. Li, taksante la raporton kiel ne objektivan kaj se riozan, proponis rifuzi bloke ĝin kaj enkonduki novan esploradon, kun scienca kaj teologia stabileco. Fakte, kvankam tiu raporto reprezentis kolosan enketon, finan citan de la episkoparo, tamen donis respondon de nur 5.200 sacerdotoj, dum la totalo de la amerikaj sacerdo toj estas, kiel dirite, 59.000. Verŝajne malpli reprezentita, kiel cetere oni antaŭvidas ankaŭ en la ĝenerala

Vatikana Sinodo, estis la temo pri "Justeco en la mondo". Kun plezuro oni konstatis, ke la tuta konferenco estis metita sub la protekton de la tre sankta Virgulino, kiel garantiaĵo de sukceso kaj fruktodono.

LA KATOLIKOJ EN USONO estas preskaŭ 48 milionoj t.e.la 23,5 procento de la loĝantaro; kompare al la 1969-a ili kreskis je 342.640. La konvertiĝoj pasintjare estis 84.534, preskaŭ ok mil malpli ol en 1969; 37.020 estas la sacerdotoj (252 malpli ol en 1969), la religiuloj 21.141 (malpli 779). Malpliigitaj ankaŭ estas la fratinoj je 7.286 unuoj. La poredukaj katolikaj institucioj, kun seminarioj, lernejoj, universitatoj kaj "colleges" estas 12.293, t.e. 529 malpli ol en 1969; la malpliigo estas la 14 procento kompare al la 1965-a jaro.

ALSTON , DE LA PROTESTANTA Unuiĝinta Kanada eklezio, vojaĝis en ĉi tiuj tagoj al Romo, por efektivigi filmon pri papo Johano XXIII. Alston, kiu estas ankaŭ prezidanto de filmindustria societo laboros parte en Romo, parte en Kanado, kun katolika pastro. La filmo havos dokumentan karakteron, daŭros unu horon, kaj estos diskonigita ĉe la pasko de la 1972-a.

LA LIMA JUĜISTARO DECIDIS ne antaŭenigi la proceson kontraŭ la helpepiskopo de la Perua ĉefurbo, mons. Bamberen, akuzita pri "atenco kontraŭ la publika trankvilo". La episkopo estis enkarcerigita kaj denove allasita post 12 horoj, la 11-an de majo, ĉar li celebris la meson al nombra grupo da senhejmuloj, kiuj okupis terenon apud la ĉefurbo. Generalo Artola, kiu akuzis la ĉefepiskopon, difinanta lin: "militanto kun klериksutano", sub la premo de la ĝenerale indigno, demisiis.

..........................................................